


La letero de l' Akademio de Esperanto

Nº 11 — Aprilo - Majo - Junio 1990

ISSN 0986-1181



Tuj esploras la lingvon kaj donas konkludojn, pli-malpli ĝustajn, pli-malpli erarajn: aliaj reprenas la gvid-ideojn de tiuj studoj kaj alportas nuancojn aŭ korektojn en etoso de amika kolegeco. La laboro de niaj esplorantoj progresas malrapide sed certe: estas salutinde! . Aliaj post sendorma nokto eltiras el sia cerbo tutan teorion pri diversaj punktoj de la lingvo: Minervo armita per ĉiuj siaj armoj el la femuro de Jupitero. Sur tia bazo ili inundas la movadon per sia peza pseŭdoliteraturo. Estas plorinde! Ni ekkonis en 1989 la lingvo-Cezaron, kiu decidis antaŭ sia spegulo kaj neleĝe ukazas ŝirme de la podio de konata asocio.

Pli frue ni jam konis la lingvo-Papojn, kiuj supraĵe studinte punkton rapidas anatemi kaj insulti diversajn aliopiniantojn. Sed nun ni havas lingvo-profeton, kiu kunigas la kvalitojn, intuicie scias, ukazas, eldonegas, anatemas, insultas kaj eĉ havas disĉiplojn; disĉiplojn, kiuj adoras lin kiel la savonton, kiel la profeton! Povraj disĉiploj vekigu! Estas ridinde!. Sed "hundo bojas, homo volas" diras la proverbo!

La Akademio iras aliajn vojojn: ĝi ŝatas kaj alte taksas la laborojn de la seriozaj esplorantoj. Plej ofte tiuj laboroj estas memsufiĉaj; ankaŭ iliaj ĝustigoj: ĉio per si mem iras glate kaj do la Akademio, silenta, ne intervenas. Ĝi intervenas, nur kiam du tezoj alfrontiĝas, montriĝas neredukteblaj al komuna prezento de la afero: kaj plej ofte kiam oni petas ĝin interveni.

La Zamenhofs instanco neniel pretendas al ia neebbla kaj nerealegebla neerari-povo. Fakte okazis, ke ĝi iam eraris: longe poste la eraro estis korektita. Ĝi bone konas la proverbon: "Kiom da kapoj, tiom da ĉapoj". Kaj estas evidente, ke 45 Akademianoj signifas 45 opiniojn. El tio defluas ankaŭ, ke por temo traktata estas bezonata sufiĉe multe da tempo; ke ĉiu decido alprenita kaj donita al la publiko reprezentas konsiderindan sumon da voĉdonoj, krom da raportoj kaj da kontraŭdiroj.

Tuj plendas, ke la Akademio laboras "kaŝe", sed eĉ ne estas sufiĉe da eldonaĵoj por publikigi la laborojn de niaj esplorantoj: la bona revuo "Esperantologio", fondita de Prof. NEERGAARD, mortis kaj ne estas preta renaskiĝi. La Akademio tamen provas konigi siajn laborojn. Por tio ĝi eldonas laŭpove sian statutan bultenon "Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto". Jam aperis 10 numeroj! La du lastaj numeroj estas pli konataj sub la plia nomo "Aktoj de la Akademio". Ili skeme prezentas per ties ĉefaj tekstoj la laborojn plenumitajn en la du periodoj 1963-1967 kaj 1968-1974 sub la prezidanteco de Prof. Waringhien. Mi tiam estis nur Direktoro de Sekcio. Esence temas en la unua pri "Enketo kaj decidoj pri la Pasivaj Participoj" kaj pri "Enketo kaj decidoj pri la Vortfarado". Kaj en la dua pri "la Oka Oficiala Aldono al U.V." kaj pri la "Baza Radikaro Oficiala". Cetere la 11-a numero de la "Bulteno", baldaŭ kompostita, reeldonos la Bazan Radikaron Oficialan; ĝi estas korektita kaj kompletigita de alfabeto listo. Uzata por diversaj lerniloj, ĝi estis ofte petata.

.../...



KRONIKO de la NUNTEMPO

JARCENTA TRADICIO

Kutimo ludas fundamentan rolon en la socia kaj sekve en la lingva vivo: la uzateco de vorto aŭ dirmaniero dependas de kutimo, kiu en Esperanto fariĝis nun pli ol centjara tradicio.

Ĉi tiu tradicio estis registrita ekde 1933 en la PLENA VORTARO, kiun sekvis suplemento en 1954, kaj la revizio de 1970 per PLENA ILUSTRITA VORTARO kun plia suplemento en 1987. Kaj ĉi tiu VORTARO restas ĝis nun la sola ekzistanta kaj farita surbaze de slipoj, sur kiuj jaro post jaro estis notadita la uzateco de la vortoj.

Sed nun laŭmoda fariĝis ankaŭ la sistemeca kritikado de tiuj verkoj ekzemple en plej lasta artikolo de Bernard Golden kun la titolo "VIPE AL PIV"*. Ja kion oni ne aŭdacus por la plezuro de ia vortludo! . Certe senĉese vortaro bezonas revizion, ĉar la vivo senĉese vivigas lingvon; sed ĉu tia revizia vivigo bezonas "vipon"?

Nu rezulte el tia ŝanĝovento mi antaŭ nelonge ricevis leterojn de gelegantoj, kiuj sin turnas al mi per plej variaj terminoj "redaktisto, redaktanto, redaktciano..." sendube por eviti la simplan Zamenhofan kaj tradician vorton "redaktoro", serĉante ja la perfektan kunmetitaĵon de "LA BONA LINGVO" de Claude Piron. Tamen Esperanto jam ne estas lingva provaĵo aŭ kobajo, sur kiu oni povas eksperimenti iun novan modon: kiel skribis D-ro L.L. Zamenhof, "La vera celo de la L.K. ne konsistas en ia facilanima eksperimentado. "Tradicion fiksas ne la parola sed la skriba literatura lingvo, la tradicio de Esperanto estas pli ol centjara, kaj la plej bona kompilaĵo de tiu tradicio restas ĝis nun la PLENA ILUSTRITA VORTARO: jen kio estas utila memorigo, ĝis venos nova reviziita formo de tia bazo!

J.T.

* Eĉ ne nur al PIV Lia Kritika Moŝto vipas! En LA GAZETO, n°27, li ĵus frapis ankaŭ kontraŭ la "Nepivaj vortoj" de André Cherpillod! Kial do riproĉi al kompilinto mankojn pri tio, kion li ne intencis fari ?

(daŭrigo de la editoralo de D-ro A.Albault)

Poste, la 12-a "Bulteno" publikigos la "Aktojn III", kiuj kovros la periodon de 1974 ĝis la fino de 1989. Ĝi ĉefe entenos la laborojn, kiuj etendiĝis sur periodo de ses jaroj kaj kondukis unue al la "Rekomendoj pri Landnomoj" kaj due al la "Norma listo de Landnomoj". La unua, konfesinde, estis tro teoria por esti sekvata de la publiko: cetere ja pro ties petoj necesis starigi la "Norman Liston".

D-ro André ALBAULT

LA LEGANTOJ SKRIBAS...

"Ne gravas, se foje vi ne konsentas... La vivo estas tia, ke ĉio progresas nur el kontraŭstarigo de ideoj! La sola problemo estas konscii pri tia neceso kaj ne transformi kontraŭstaron de ideoj en kontraŭstaron de homoj!"

1/ Skandalo.

"Post ĵusa legado de LA LETERO DE L'AKADEMIO kaj ĉefe de la respondo de A. Albault al L. Marin mi ŝatus alporti mian kontribuon en tiu "ino"-afero.

Jen la fakto: de pluraj jaroj mi estas "UEA-delegitino" en Baugé. Kvankam mi klare indikis sur la koncerna slipo "instruistino" la jarlibro de UEA montras min "instruisto". El tio rezultas, ke mi ofte ricevas leterojn ne nur de ali-landanoj sed eĉ de Francoj(!) al Sinjoro Jeannine Vincent: kio estas al mi tre malagrabla! Ĝis nun mi ne ricevis peton pri edziĝo, sed povus okazi... Mi protestis ĉe la ĉefdelegitino, ĝuste L. Marin, kiu respondis: "Estas pli kaj pli kutimo fari tion laŭ la angla modelo". Laŭ mi tio estas skandalo!

Se la esperantistoj ne kapablas rezisti al la angla premo, kial do ili plu lernu kaj uzu Esperanton? Ili estu logikaj kaj konsekvencaj!"

R.- Sendube en tiu tempo, kiam laŭmoda siblas la akuz-pledo de "LA BONA LINGVO", estas celtaŭge montri, kiom da aliaj influoj ricevis/as la lingvo. En recenzo de MONATO ĝuste pri la "francaj" influoj analizitaj de Claude Piron en sia verko Stefan Maul demandas sin: "Estus interese se foje iu alia kompetenta aŭtoro verkus simile pri aliaj influoj, ekz-e la germana!"

La demando pri la uzo de in fariĝis jam de kelkaj jaroj sub la premo de feminismo ia nekredinda "nodo da vipuroj" nemalplektebla: tion montras dek-unu paĝoj de la tezo de D-ro F. Lo Jacomo kaj la ĝusteco de la opinio de D-ro L.L. Zamenhof: -in estas sufikso por precizigi laŭnecese, ke temas pri virino. Kaj tamen - ni aldonu- ne malofte estas necese ĉar utile!

2/ Francismo?

"Kiam oni povas diri (esprimi) pli facile, oni faru tion. Mi ne scias la francan lingvon, sed havas Esperanto-francan vortaron(...). Mi esperas, ke en la eldonaĵo de la Akademio oni zorge evitu superfluaĵn vortojn, eĉ se ili troviĝas en PIV".

N.A.

R.- Konsidere la vorttrezoron de Esperanto LA LETERO kutimas jam de la unua numero uzi la internacian formon de la Lingvo registritan ĝuste de PIV en 1970, do tiam post 83 jaroj da evoluo. Ĉi-rilate estu permesite rimarkigi, ke PIV estas la verko de pli ol kvindek kunlaborantoj el plej diversaj nacioj, kiuj neniam trovis "superfluaĵn" vortojn eĉ de franclingva deveno!

3/ Lingvo-elito?

"La lingvouzo estas tre francisma, ŝtopita per ne necesaj vortoj kiel: trimestra, devanci, agapo (³...). Nia demando estas, ĉu LA LETERO" estas destinita al ia eŭropa lingvo-elito, aŭ al esperantistaro kiu serioze interesiĝas pri la lingvo".

I.E.I./Hago

R.- El la tri vortoj, kiujn vi citas kiel ne necesajn, nur unu estas francdevena! La vorto agapo estas nek francismo, nek anglismo: ĝi devenas de la greka lingvo kaj estas jam de longe uzata en Esperanto eĉ de D-ro L.L. Zamenhof kaj precipe antaŭ la Dua Mondmilito, kiam ĝi koncernis komunajn manĝojn inter geesperantistoj kaj framasonoj. Trimestra estas uzata nur en la fina teknika teksto por la devigaj laŭlegaj indikoj. Cetere ne el franca deveno sed el la latina ĝi ekzistas kaj en la angla "trimestral, trimestrial", kaj en la itala "trimestre, trimestrale", kaj en la franca "trimestre, trimestriel". Nu estas okazoj kiam trimestra estas ĝusta vorto; aliaj okazoj, kiam trimonata estas pli elvokiva kiel en romano; eĉ aliaj okazoj, kiam kvaronjara estas ankoraŭ pli celtaŭga ekzemple por instru-programoj. Fine do nur devanci vere estas de franca deveno sed jam de multaj jaroj uzata (PIV kaj Suplemento), kaj en la kunteksto kun figura senco: ne nur antaŭeniri sed krome intence gvidi la evoluon.

.../...

Sekve LA LETERO estas destinita nek por lernantoj de la unua jaro nek por "ia eùropa lingvo-elito", sed por ĉiuj lingvo-amantoj, kiuj "serioze interesiĝas pri la lingvo" sen politikaj aù dogmaj aprioraĵoj.

4/ Lingvo-sento.

"Evidentiĝas/is, ke ĉiu el ni uzas/is la lingvon laù sia propra lingvosento (pro tio tiuj diversformaj vortoj rilate vian funkcion.). I.E.I./Hago

R.-Se laù "propra lingvosento" eblas uzi plej diversajn vortformojn, tiam por la unueco staras la demando, kiel elekti el pluraj eblecoj: redakci-ano, ĉef-redakci-ano, redakci-isto, ĉefredakci-isto, redakciestro, redakt-isto, ĉefredakt-isto, redakt-istestro... redaktoro, ĉefredaktoro. Kiel trovi la plej bonan kunmetitaĵon de "LA BONA LINGVO", ĉar, kiel montris Herbert Mayer pri "Fernsprecher", la signifon definitivan de kunmetitaĵo nur kutima uzado precizigas per ia sencoretrolimiĝo. Koncedinde, ke la ĉi-supra listo estas troigo da eblecoj, sed nur por pli okulfrape montri, ke lingvo-unueco dependas ĉefe de tradicio, kiun fiksas ne la parola lingvo sed iom post iom la instrua lingvo, kiu rezultas el la literatura, kaj precipe por Esperanto la principoj de la "FUNDAMENTO". Sekve, konsidere ke "redaktoro" ne estas iu ajn redaktisto, sed tiu, kiu planas, ordigas kaj prirespondecas la enhavon, ĉu la Zamenhofa formo redaktoro ne estas fine la plej bona?

5/ PIV:lingva Biblio.

"En nia klubo "La Letero de l'Akademio" estas atente legata kaj komentata. Cele al evito de dialektiĝo de nia lingvo oni konsideras PIV-on- kvankam neperfekta kaj plibonigebla- nia Biblio, kaj la Akademianojn niaj "profetoj". Tial, kiam io ne konformas al nia sentmaniero, ni sentas nin kvazaù perfidataj.(...) Pri la libro de Piron evidentas, ke ĝi entenas tre personajn opiniojn.(...)"

A.V.

R.- Estas ĝojo konstati, ke "LA LETERO"ne estas vana laboro kaj ke pluraj konscias pri la "evito de dialektiĝo". La malbona flanko de la libro de Piron estas la sistemigo, kiun siatempe Raymond Schwartz jam prilumis per sia "Simpligita Anatomio":

"Gesinjoroj, la homa korpo konsistas el tri partoj. La unua estas la kapo, sur kies tegmento kreskas la kapfadenoj, kelkfoje kaj ĝuste ankaù nomitaj pedik-arbaro. Por kaŝi aù ornami la kapfadenojn oni surmetas kapkovrilon, kiu ludas ankaù la rolon de salutaparato. Sur la kapfasado troviĝas du vidiloj. Inter ili estas la flarilo, kiu - pli speciale dum la vintraj monatoj - fariĝas mukfonto. Sub la mukfonto malfermiĝas la manĝotruo, kiun enkadrigas du manĝotrurandoj. (...°)

Ĉe ĉarmaj fraùlinoj kaj junaj edzinoj tiuj manĝotrurandoj nomiĝas ĝenerale kiskusenoj".

(daùrigo de la N.D.L.R.)

Finfine tio montras ke la celo de la Akademio ne estas proponi neologismojn eĉ raciajn aù poezielvokajn, sed nur arbitracii konfliktajn okazojn.

Sekve tiaj proponoj estas nur personaj, kiel ajn alte oni eventuale ŝatus ilin, ĉar la enkonduko de vortoj povas rezulti nur de ĝenerala akcepto kaj uzado.

*

*

*

LA HISTORIO KAJ SIGNIFO DE LA RADIKO « RAM/— » EN ESPERANTO



1. Enkonduko

De tempo al tempo venas al la direktoro de la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro de la Akademio de Esperanto demandoj pri la preciza signifo de vortoj aŭ afiksoj, petoj pri la aprobo de proponitaj neologismoj, kaj deziroj, ke la Akademio serĉu konvenajn vortojn por specifaj konceptoj. Ŝajnas, ke pluraj esperantistoj opinias, ke membroj de la Akademio havas kapablon facile kaj rapide decidi pri tiaj aferoj, sed efektive, ofte estas necese fari tre temporabajn esplorojn por ekzameni ĉiujn aspektojn de la demandoj antaŭ ol akiri firman bazon por tiri konkludojn kaj doni konsilojn. En antaŭaj numeroj de La Letero mi tuŝis kelkajn temojn, rilatantajn al mia okupiĝo pri la leksiko de Esperanto (1). En tiu ĉi artikolo mi pli detale prezentos la labormetodon, kiun mi utiligas por pritrakti demandojn pri la signifo kaj uzo de vortoj en Esperanto. Mi uzos kiel ekzemplon la substantivan radikon "ram/o", al kiu Plena Ilustrita Vortaro (PIV) donas jenajn difinojn:

1. Trabo, fortikigita ĉe unu ekstremo, kaj uzata de antikvuloj, por rompi muron de sieĝata urbo; = murrompilo. Vd. rostr.
2. (Teknikoj) Maŝino en formo de granda stampilo uzata por enbati firme en la grundon fostojn, pavimŝtonojn ks: vapormova, aerprema, elektra ramo; rami (tr). (Teknikoj) Mane aŭ maŝine enbati (fostojn ks). Manramo. Pavimbatilo. La analizo de la semantiko de "ram/—" demonstros, ke tiuj difinoj ne estas adekvataj.

2. Manko de internacieco de la radiko "ram/—".

D-ro André Albault, la prezidanto de la Akademio de Esperanto, kadre de pritrakto de du specoj de internacieco, ordinara kaj monda, objetas kontraŭ la ĉeesto de "ram/—" en la leksiko de Esperanto (2). Li asertas, ke la internacia vort-trezoro devenas plejparte el lingvoj latineca aŭ latinidaj, kiuj estas tre gravaj, ĉar "proksimume parolas ilin, denaske aŭ postlerne, unu homo el kvar", kaj tiu supereco de nombroj starigas kriterion por determini la internaciecon de leksika materialo por uzo en esperanto. La Akademia prezidanto avertas, ke "estas principe eraro enkonduki vorton, kiu forme similas al vorto de tiu trezoro sed havas alian sencon". Li montras, kiel la radiko "ram/—" ilustras tian mispaŝon, ĉar estas malakordo inter ĝia signifo kaj la signifo de multe pli vaste uzata homofona morfemo en la latina kaj latinidaj lingvoj; temas pri ram, uzata por formi vortojn pri diversaj specoj de branĉoj, branĉetoj kaj branĉaroj, ankaŭ en figuraj sencoj.

Ekzemploj: L. ramus-branĉo; F. rameau-branĉeto, frondo; I. rama-branĉeto, ramo-branĉo; His. rama-branĉo. Kvankam la angla estas ĝermanida lingvo, ĝi havas jenajn latindevenajn vortojn: ramate-branĉ-hava, ramification-disbranĉiĝo, ramiform-branĉ-forma, ramify-disbranĉigi, -branĉiĝi, ramose-branĉ-riĉa, ramous-branĉ-simila, ramus (anatomio) longa osta proceso, nerv-branĉo.

Male, la lingvoj, kiuj havas vorton, akordantan forme kaj signife kun "ram/o" en Esperanto, apartenas nur al la ĝermanida branĉo. Ekzemploj de substantivoj kaj verboj: A. ram, to ram; G. Ramme, rammen; Sved. ramm, ramma. kunmetitaj substantivoj estas: Ned. stormram kaj Norv. rambukk. Surbaze de tiu distribuo de la homofona morfemo ram, Albault argumentas, ke la radiko "ram/—" en Esperanto estas misgvida por unu kvarono de la loĝantoj de la Tero, kiuj inkludas doni al "ram/—" la sencon de "bran(et)o". Sekve, li konkludis, ke "ram/—" ne posedas sufiĉe da "monda internacieco" por meriti lokon en la leksiko de esperanto.

3. Historio de "ram/—" en Esperanto

La unua paŝo de nia esploro estas spuri la historion de "ram/—" en Esperanto por determini, kiam ĝi estis enkondukita kaj kiu respondecis pri tio. Jen en resuma formo la rezultoj de trakribo de dekoj da vortaroj.

1970 - PIV registras la substantivan radikon "ram/o" kaj la verbon "rami".

1967 - En la Esperanta-angla vortaro de M.C. Butler, "rami" estas la kapvorto kaj la substantiva "ramilo" estas pluformita per sufikso. Aliaj etnolingvaj Esperanto-vortaroj publikigitaj antaŭ kaj post tiu dato same formas la substantivon, aldonante "-il" al verba radiko.

.../...

1967 - En sia germana-Esperanta teknika vortaro, Rudolf Haferkorn uzas nur la formon "ramo" kiel substantivon.

1954 kaj 1934 - La radiko "ram/-" mankas en Plena Vortaro kaj ĝia Suplemento.

1934 - "Rami" kaj "ramilo" estas registritaj en la sveda-Esperanta vortaro de Jansson, Lindén kaj Gerdman.

1909-1910 - Emile Boirac registras "rami" kaj "ramilo" en sia Plena Vortaro.

1908 - "Ram/-" venas de la angla verbo to ram. Joseph Rhodes inkludas "rami" en la listo "Radikoj enkondukitaj de la kompilinto" de sia angla-Esperanta vortaro.

Kvankam "ram/i" fariĝis Esperanta vorto antaŭ pli ol ok jardekoj, nur en 1989 venis en ies kapon la ideo kontesti ĝian legitimecon pro apokrifa internacieco.

4. Semantika analizo de "ram/-"

Ne ĉiuj vortaristoj akceptis la radikon "ram/-"; ili trovis aliajn manierojn esprimi ĉiujn signifojn de la etnolingvaj verboj kaj substantivoj, uzante la ekzistantan vortprovizon de Esperanto. La dua fazo de nia esploro konsistas en analizo de la konceptoj, kiujn ampleksas "ram/-". Ili formas du grupojn.

	A	B
verboj	enŝovegi, puŝbategi, puŝfrakasi, breĉi	enbati, batpremi, terbati, bateben- igi, malsuprenbat(eg)i, enpuŝ- (eg)i, repuŝegi.
substantivoj:	puŝbategilo, murbatilo, mur- rompilo, ŝipnazo, pruo, prupinto, sprono de ŝiprostro	pavimbatilo, palisenbatilo, (fal)martelego, martelmaŝino, batpumpilo

Okulfrapa konstato estas, ke la du grupoj da vortoj diferencas en kvar manieroj: 1. en A la direkto de movado estas horizontala, en B, vertikala; 2. en A la forto estas direktata kontraŭ muron, ŝipkorpon ks, en B sur teron, argilon, betonon, pavimŝtonon, palison ks; 3. en A la celo estas detruo per disfendado kaj breĉado, en B temas pri prepar-laboro por konstruado per kompatigo kaj subtenado; 4. vortaraj signoj en A klasifas la vortojn en la fakojn militan, maran kaj historian, dum la vortoj en listo B estas signitaj kiel teknikaj kaj mekanikaj. Tiu ĉi duopo da semantikaj konceptoj sugestas, ke por klara, neambigua esprimado en Esperanto, estas konsilinde havi du malsamajn radikojn.

5. Komparo de alilingva esprimado de la konceptoj.

En kelkaj lingvoj ekzistas malsamaj vortoj aŭ terminoj por la du specoj de aparatoj:

	A	B
angla	<u>battering ram</u>	<u>pile-driver, tamper</u>
franca	<u>bélier</u> (de guerre)	<u>mouton</u>
itala	<u>ariete</u> (macchina da assedio)	(macchina) battipalo
rusa	<u>taran, baran</u>	<u>baba, koper</u>
pola	<u>taran</u>	<u>baba, kafar</u>
Ido	<u>arieto</u>	<u>tampilo</u>

Krom la diferencigo de la du grupoj A kaj B, la vortoj en ĉiu listo estas tro malsamaj. Menciinda estas I. ariete, kiu havas la saman formon kaj signifon en la hispana kaj portugala lingvoj; ili devenas de L. aries signifanta virŝafon kaj ankaŭ horizontale funkcianta puŝbategilon. Se ni turnas nin al kelkaj planlingvoj, ni trovas, ke krom Ido (aristo) ankaŭ Novial kaj Interlingua (IALA) uzas ĝin en la formo ariete. Interlingua havas ankaŭ la verbon arietar, la adjektivon arietari kaj la ag-substantivon arietation. Du esceptoj estas Occidental / Interlingue kun la germanid-devena ramme kaj verbo (in)rammar, kaj Neo kun la francdevena belyer. Ĝis nun mi ne trovis planlingvon, kiu elektis slavdevenan vorton, kiel proponis Albault. Surbaze de la rusa verbo trambovat (batpremi) kaj trambovka (batpremilo), li formis "trambi" kaj "trambilo" kaj, aŭdante la reeŝon de la sono de la tremanta tero - tramb! tramb! - li pensis, ke "tiel oni atingas artisman enprenon de "neologismo". Mia opinio, oni adoptu neologismon ne "artisme" sed racie.

.../...

6. Pravigo de la internacieco de la neologismoj "ariet/o" kaj "tamp/i"

La latina vorto aries (genitivo: arietis) signifas virŝafon kaj estas la nomo ankaŭ de antikva militmaŝino uzata surtere por breĉi murojn kaj sur militŝipoj por disfendi ŝipkorpojn. Ĝi akiris la nomon aries, ĉar unu ekstremaĵo de la fortikigita horizontala trabo estis provizita per skulptaĵo havanta la formon de kapo de virŝafo. La vortformo ariete estas uzata en kelkaj latinidaj lingvoj: en aliaj lingvoj la aparato havas la saman nomon kiel tiu de virŝafo. Rimarku, ke Aries estas ankaŭ la latina nomo de la konstelacio kaj zodiaka signo, kiu en Esperanto nomiĝas "Ŝafo" aŭ, "Arieso". En kunteksto estas apenaŭ eble, ke okazos konfuzo inter "Arieso" kaj "arieto". Arieto/ariete troviĝas ankaŭ en planlingvoj. La etimo de "tamp/i" same kiel Ido tampar estas la angla verbo to tamp. Ĝi havas etimologian rilaton kun vortoj en la plej gravaj latinidaj lingvoj, kvankam la signifoj estas iom malsamaj: F. tamponner, I. tamponare, Port. tampar, tapar. His. taponar, tapar. Tiuj vortoj signifas ŝtopi, korki, kovri, sed tampar en Ido havas difinon proksiman al tiu de la angla verbo to tamp:

enbati pavimŝtonon, enpuŝegi palison. La sekvaj difinoj de "ariet/o" kaj "tamp/i" estas pli precizaj ol tiuj en PIV sub la kapvorto "ram/o".

ARIET/O. Fortika, trabforma objekto, kiu estas puŝata horizontale kun granda forto kontraŭ pordon, muron aŭ ŝipŝelon por disfendi aŭ breĉi ĝin. Ĝi estis karakteriza militmaŝino en la antikveco, uzata ĉe sieĝoj de fortikaĵoj kaj urboj kaj sur ŝippruoj en marbataloj. ARIET/I (tr³).

TAMP/I (tr.). Per uzo de forto en vertikala direkto, premi, ebenigi aŭ kompaktigi substancon kiel teron, argilon, betonon ks, aŭ enbatigi pavimŝtonojn, fostojn, palisojn ks. La forto povas esti permana aŭ mekanika. TAMP/ILO, TAMP/MASINO.

7. Notoj

1. Neglositaj neologismoj. La Letero de l'Akademio de Esperanto. 1988 januaro 2:3.
Superrigardo de neologismoj: la kazo de "sgrafito". "La Letero de l'Akademio de Esperanto. 1989, januaro, februaro, marto. 6:5-7. Esploro pri la signifo de "ik" en Esperanto. La Letero de l'Akademio de Esperanto. 1990 jan. febr. mart. 10: 4-7.
2. Cirkulero n-ro 163 de la Akademio de esperanto. 15 oktobro 1989. Pĝ. 3, sekcio 6: "Internacioj ordinara kaj monda".

Bernard GOLDEN
Direktoro de la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro

N.D.L.R.

1) - En la Suplemento de PIV "ram/o" estas eĉ teknika akronimo pri komputora memoro (random access memory).

5) - Ĉi tiu paragrafo levas plurajn demandojn!
- Ĉu neologismo estas elektinda nur pro racio? Ĉu la poezivekaj vortoj ne havu sian lokon en la lingvo? Ĉu ne eblas opinii ĝuste la malon de la aŭtoro?

6) - Ĉu "arieto" estas bone akceptebla? La vorto estas jam uzata en beletro kaj muziko kun la senco "eta ario" kaj la bruego de la maŝino certe ne kongruas kun tia senco! Ĉi-rilate eĉ pli bone taŭgus "trambi".
Ĉu D-ro L.L. Zamenhof mem ne plivastigis la leksikon per enpreno de slavaj radikoj, kiam tiuj ĉi montriĝis al li bonvenaj? Esperanto ja ne estas ia Ido aŭ Interlingua! Ĉu eĉ "arieso", same kiel la konstelacia Arieso, ne pli taŭgus?

(daŭrigo sur paĝo 4)

.../...

DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ

D.- "Hodiaŭ mi devas...skribi al...telefoni al...kaj paroli kun..."

Nu por komenci mi telefonos...Tia dirmaniero estas ĝusta; sed mi ne povas diri:"Mi komencos per telefoni", tia konstruo estas erara, mi ja scias, sed mi ne bone komprenas kial." (A.Rispał)

R.- Infinitivo estas verba formo "prezentanta la agon aŭ staton en plej ĝenerala sendifina maniero"^o, kaj ĝuste en multaj lingvoj ĝi povas principe plenumi ĉiujn funkciojn de substantivo (subjekto, predikativo, rektaĵoj aŭ nerektaj objektoj, adjekto aŭ suplemento).

Tamen antaŭ infinitivo la Esperanto-tradicio limigas la uzon de prepozicioj je kelkaj: - por - anstataŭ - krom -; malofte estas uzataj:- inter²- antaŭ ol-kaj eĉ maloftege - sen - kun nuanco de insisto*

Vi povas do komenci ion, komenci skribi aŭ telefoni, sed komenci per nur per skrib(ad)o aŭ telefon(ad)o. Tia estas la uzateco, kaj verŝajne pro tio, ke la prepozicioj en Esperanto funkcias ankaŭ kiel prefiksoj. (Konsideru la kunmetitaĵojn: - perlabori - perludi - perflati ktp. kaj la riskon de du(b)sencaĵoj!

J.T.

o) difino de P.I.V.

2) Inter voli kaj fari estas grandega paŝo.^z

*) sen fari = eĉ ne farante.

E L L A G A Z E T A R O

La opinio de la saĝo el MONATO (januaro 1990):

Stranga kritiko

Dum multaj jaroj multaj homoj postulis harmoniigon de landnomoj kaj forigon de l' ĥaoso ĉi-kampa. Ankaŭ en MONATO ni detale traktis la problemon antaŭ kelkaj jaroj, eĉ per iuspeca enketo inter niaj legantoj. Kaj ni forte instigis la Akademion de Esperanto, kompili definitivan liston.

Nun finfine ni havas tian liston de normaj nomoj de ĉiuj landoj. Sed kio okazas? Anstataŭ ĝoji pri tio kaj laŭdi kaj gratuli la Akademion pro tio, oni kritikas kaj kritikadas kelkajn malmultajn formojn, ofte sen funde studi la koncernajn klarigojn kaj argumentojn. Iuj Esperanto-revuoj eĉ rifuzas aperigi la liston, tiel rabante al siaj legantoj la okazon, entute ekkoni kaj diskuti la normajn nomojn. Efektive, tiel agante, iuj organizaĵoj eksidas sur la trono de lingvopapo, pli supera ol nia plej supera lingvoinstanco instalita ja de Zamenhof mem.

Tiaj, vere strangaj kritiko kaj konduto

simple forgesas aŭ intence pretervidas, kian gigantan laboron ja plenumis la Akademio, kaj ke la rezulto ja estas impona. Oni kvazaŭ malagnoskas, ke pri pli ol 90 elcentoj de la landnomoj nun ne plu regas malcerteco. Vere pro tio oni devas emfaze dankegi al la Akademio kaj precipe ankaŭ al ties prezidanto, d-ro A. Albault, kiu plej energie antaŭenigis ĉi tiun laboron.

El multaj kritikoj pri la kelkaj eble ne tute kontentigaj formoj oni devas konkludi, ke tiuj kritikantoj miskomprenas la rolon de l' Akademio, kiu nek povas nek volas dikti ion, sed laŭ sia konstitucio nur eldiras rekomendojn, aprobojn aŭ malaprobajn. Kompreneble ĉiu havas la rajton, kritiki decidojn de la Akademio, sed neniu havas la rajton insulti ĝin kaj ĝiajn membrojn. Kaj ĉiu rajtas sekvi aŭ ne ĝiajn rekomendojn. Tiuj, kiuj preferas ne sekvi la rekomendojn, provokas la riskon de disdialektiĝo de la lingvo. MONATO ne volas esti inter tiuj, kiuj kulpas pri tia disfalo de lingva unueco. Do, dankon al la Akademio!

MAUL Stefan

"LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO", trimestra informa letero eldonita de "La Amikoj de l' Akademio de Esperanto", 5, rue Léon Cogniet F- 75017 PARIS- Francio

Redaktoro: Jean THIERRY, Direktoro de la publikaĵo: André BOURDEAUX Presejo: Coconnier, Sablé s/Sarthe. C.P.P.P. n-ro 69710 I n-ro: 40 FRF Jara abono: 120FRF. Pagebla ĉe kontoj:

Banko: Crédit Lyonnais n-ro 7090 F Poŝtĉekkonto: 735 27 B Paris

U.E.A.: Poŝta Banko Nederlando 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag): precizigi "por la Amikoj de l' Akademio de Esperanto".

Peranto por tuta Azio: S-ro UMEDA Yosimi, I.P.O.B. 5458, Tokyo 100-31 Japanio

Peranto por Meksiko: S-ro Enrique LEMUS RODRIGUEZ, Insurgentes Sur.3493; villa Ilimpica edif.27-001 14020 Tlalpan, México DF Meksiko.